VERMANDERE GUSTAVE (Gent 1892-Antwerpen 1957) -Belga.- -Esperantiĝis en 1911 en Gento, akiris la diplomon de profesora kapableco (1914) kaj iĝis la help-sekretario de la tiea E.G. ĝis 1914. Komercisto en Antverpeno, li tie ekde 1921 vigle partoprenis la iniciatojn de la grupo "La Verda Stelo" kaj fervore plenumis ekde 1924 la rolon de delegato de UEA. por Antverpeno. Li iĝis sekretario de la tiama "Antverpena Komitato por Internacia Komerca Lingvo" kaj en 1926 kunfondis la eldonejon "Belga Esperanto Instituto", kies prezidanto li estis dum tri jaroj post la morto de Frans Schoofs. En 1928 li estis membro de la L.K.K. por la U.K. en Antverpeno. Dum la 2-a mondmilito Vermandere plej aktive laboris al la Belga Ruĝa Kruco.

Vermandere Gustave Charles, belgo, negocisto. Nask. 5 sept. 1892 en Gent. E-isto de 1911, helpsekr. de la EG en Gent ĝis 1914. Translokiĝis al Antwerpen en 1921, tiea UEA-del. de 1921. Sekr. de la A-a Komitato por Int. Komerca Lingvo. Sin okupas pri regula dissendo de E-e redaktitaj prospektoj, reklamiloj, prezaroj, katalogoj, gvidfolioj, jurnaloj, ktp. al laŭfake elektitaj belgaj E-istoj.. Kunfond. de BEI kaj ĝia adm. Komitatano de la EG »Verda Stelo«, de 1924.